

Johann Gottfried Hientzsch,

Kanto de ligo

tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof

Fratoj, manon donu kore
 Kaj senzorge, sendolore
 Belan horon festu ni!
 Ĉion teran forĵetante,
 Daŭru forte kaj konstante,
 Nia bela harmoni'!

Al la Dio kantu gloron:
 La spiriton kaj la koron
 Kial donis la ĉiel' ?
 Serĉi lumon por vereco,
 Serĉi virton per justeco
 Estu nia sankta cel'!

Homoj en la oriento,
 Homoj en la okcidento.
 En la sud' kaj en la nord'!
 Alte teni homan nomon,
 Kore ami ĉiun homon
 Estu nia liga vort'.

*Traduko de la Germana poemo "Bundeslied" de JOHANN GOTTFRIED HIENTZSCH (*1787 – †1856) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, *1859-12-15 – †1917-04-14).*

Arg-279-569 (2014-02-15 13:23:44)

Tiun ĉi tradukon mi prenis el la interretejo "http://www.cezarkulturo.de/154385.html" de Hans-Georg Kaiser (Cezar). Ĝi troviĝas ankaŭ en la kolekto "www.literaturo.dk" sub http://literaturo.dk/novaj.htm.